Heinrich Geurtz,

# Karnavalo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

La pastro pensis longe pri
la Dia vort' kaj kiel li
chi tiun komprenigu al
la homoj - malgrau karnaval'.

Nuntempe sidas multaj en
preghejo lia mute jen,
kaj rigardante tiujn chi
pri l' senutil' konscias li

de kelka lia predikad',
ke karnavala parolad'
efikas ofte multe pli.
Pro tio rimpredikas li

pri chiam validanta tem',
ne nur en karnavalo mem,
pri tiu psalmoverso chi:
“Mi ghojas nur pri mia Di'.”

Char mankas ja al homoj ni
tre ofte ghojo, ni des pli
nur zorgu, ke al chiu sur
la tero restu la humur'.

La homoj ofte estas ja
tre amarsentaj kaj sen la[2]
humuro, kiu estas rar',
precipe che la kristanar'.

Kaj kvnkam karnavalo chi
infaono de la eklezi'
ja estas, kiel scias vi;
sed longe jam forkuris ghi.

Se nun, dum la tritaga fest'
amuzas sin de l' mondo rest',
trankvilighante pensas mi:
“Mi ghojas nur pri mia Di'.”

. . .

Heinrich Geurtz,

# Karneval

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

. . .

[2] au:
amaranimaj kaj sen la

*Traduko de la Germana poemo "Karneval" de Heinrich Geurtz en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1997-02.*

*MR-294-1 / Arg-776-1556 (2013-01-18 11:07:54)*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Heinrich Geurtz.*

*Arg-776-1555 (2013-01-18 12:06:14)*

*Tiu ĉi poemo aperis en 1997 en la gazeto "Kirche und Leben", la organo de la eklezia katolika episkopejo de Monastero (Münster/Westfalen, Germanio), en la numero 6-1997. La adreso de pastro Heinrich Geurtz estas: Gocher Straße 56, 47589 Uedem, Germanio.*